

*Komygita - ola*

# BULGARA ESPERANTISTO

**Organo de Bulgara esperantista asocio**

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levon;

korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble.

Adreso: str. Alabin, 50, SOFIA, Bulgario.

**Jaro XVII**

**Januaro-Februaro 1936**

**№ 5-6**

**Prenu noton pri nia nova adreso, menciita supre. La Bulg. esp. asocio havas la saman adreson!**



**Rivero Zlatna Panega**

**PRINTEMPA NATURO**  
**EN BULGARIO**



**Rivero Vit super la urbo Teteven**

D-ro A. S. Batěk, Praha.

## El kio ni vivas?

Tio estas demando, kiun eldiris kaj respondis la angla fizikisto Frederic Soddi en sia tre interesa verko „Kartesiana ekonomio“. Li respondas tiun demandon laŭ fizika vidpunkto per mallongaj vortoj: Per la sunradioj! Jes, la suno estas tio, kio ebligas la tutan vivon sur nia planedo. Se la suno estingiĝus, la tuta vivo tuj finiĝus. Estas sendube, ke la suno direktas la ventojn same kiel ĝi vaporigas ĉiujn riverojn kaj la aliajn akvoflujojn, kiuj revenas al la tero kiel pluvo. Se tio ne okazus, ĉiuj akvoj fludus al la plej malalta parto de la tero, al la maro, kaj neniu akvo restos sur la montoj kaj neniu akvofonto povus komenci sian migradon por reveni al la maro. Se tio ne okazus, estus ĉie dezerto. Estas fakto, ke la homo konstruis la unuajn maŝinojn pro la forto de la vento kaj la akvofluro. Tiam li komencis eluzi iom post iom la energion de la suno.

Sed ekzistas ankoraŭ grandaj ujoj de energio, kiujn la suno metis dum milionoj da jaroj en la teron kiel ŝtonkarbon. Kiam la homo sukcesis atingi tiujn provizojn de la suno, kiam li lernis eluzi tiun kaŝitan energion kaj ŝanĝi ĝin en la vaporforton, tiam ekestis la unua vapormaŝino, per kiu la homo fariĝis la estro de la naturo. La karboepoko donis la fundamenton al nia nuna civilizacio.

Sed kialmaniere la suno metis antaŭ centmilionoj da jaroj tiun energion en la karbminejojn? Tiamaniere, kiel ĝi metadas ĝin tien nuntempe. En la mondo ni observas tri regnojn de kreitaĵoj, el kiuj ĉiuj havas sian apartan taskon en la mondprogresado. Ekzistas la regno minerala, kiu sin direktas laŭ la ĥemiaj leĝoj, la regno vegetala, kiu estas la regno de individuoj, kiuj kapablas preni nutraĵojn el la regno minerala, kaj kiuj scias konduki la mondon al la pli alta nivelo de vivanta ĉelo, kaj fine la regno animala, kiu prenas la energion el la regno vegetala kaj kiu kondukas ĝin al movo kaj diversspeca vivo animala. Sen kreskaĵoj povus vivi nek bestoj, nek homoj kaj tial la agrikulturo estas la plej granda provizejo de nutraĵoj por ni ĉiuj. Tiu ĉi

signifo altigis la agrikulturon speciale dum la mondmilito, kiam la provizado estis akso. Ĉirkaŭ kiu sin turnis la vivo en la batalkampoj same kiel hejme. La hodiaŭa signifo de la agrikulturo devenas de tiu ĉi kompreno. Sed plantokulturado estas ĝuste la laboro per la karbo kaŝita en la karbooksido, en gazo nevidebla, kiun la plantoj kapablas ŝanĝi en karbohidratojn, profitante la energion de sunradioj, kaj fine en vivantan materialon, kiu estas la fundamento de nutraĵo por la bestaro. En pratempoj, kiam la kreskaĵoj estis solaj en la mondo, kiam la karbono de iliaj korpoj ne estis konsumata de la regno animala, tiam la trunkoj de gigantaj filikoj tiutempaj seke putriĝis kaj konservadis sin en tavoloj, kiuj, liberigitaj de oksigeno, produktis sub grandega premo karbotavolojn. Kaj la nuntempa homo ligas tiun ĉi energion pratempan kun la hodiaŭa energio de la sunradioj, la homo kapablas hodiaŭ regi tiujn grandegajn fortojn, li produktas maŝinojn, — robotojn, por ke ili laboru anstataŭ li, kaj li atingis tiel la epokon de la granda industrio, kiu estas la fundamento de la nuna civilizacio. Kiel longe daŭros tiu tempo? Tiel longe, ĝis kiam la karboprovizoj estos elĉerpitaj. Tiu tempo estas rilate mallonga, kiu donas al la homo unikan okazon lerni majstri la naturfortojn kaj per ili prepari al si kaj al siaj posteuloj la paradizon sur la tero. Tio estas okazo, kiun ni devas akcepti kaj eluzi por la plibonigo de la homaro. Sed se ni tiun ĉi okazon preterpasos pro la stultaj militoj kaj pro partiaj bataladoj kaj ne eluzos ĝin pro tio, trovi novajn fontoj de energio anstataŭ la karbo, ni povas fari testamenton! Ni atingos tion, kion ni plene meritas, detruadon de la tuta civilizacio kaj pereigon de la tuta vivo, kiun ni tiel malatentas, malzorgas — Ni do komencu lerni esti prudentaj, pacemaj kaj ni laboru por la savo de la endanĝerigita homaro.

## El profundoj

Al \* \* \*

Ho, kiel absurda aspektas la peno de l'vivo,  
kaj kiel mizeraj kaj vantaj la zorgoj de l'tag'!  
pri ili kun kia malam' en falanta zigzag'  
al mia abismo kun rid' malestima mi drivas,  
insultas ebria, freneza —  
hereza!

Samkiel vampiro mi suĉas la ĝuojn avide  
kaj moke neglektas la leĝojn de l'homa soci',  
en amo ne rompas sin kora kruela glaci' —  
nur pekaj ekvoloj la sangon malpuran agitas...  
Sed — — kial singultas angoro  
en koro?

Bruligas min vundo malnova, denove tuŝita,  
samkiel vundita rabbesto mi hurlas en sol',  
sentante ekflamon de l'lasta brulkarbo de l'vol'  
kaj ian kapturon en plej nekutima ekscito.  
Kaj unu vizio mensoga  
min logas.

Ho, kiu vi estas, estaĵo mirakla kaj stranga,  
kun viaj okuloj el kiuj alblovas mister'  
kaj kun aŭreolo lumanta sur mia sufer'  
kaj min alloganta al suproj majestaj kaj blankaj?  
Silentu, silentu — ne diru! —  
foriru!

Min lasu formorti en mia narkoto infera,  
per kies venenoj mi vivas — sed kiel mumi',  
ke fine — lasita de ĉiuj amitaj de mi —  
forputri en lum' — kun rezigno kaj kun... malespero.  
Ho vi — kontraŭdiro terura —  
aŭgura!

— — Descendis al mi unu mola radi' el la bluo —  
kaj monstre malbela retiris sin mia anim',  
kaj multaj turmentaj demandoj, konfuzo kaj tim'  
plenigis la solon per teda rikano kaj bruo.  
Ho, kiel la brusto sin ŝiras,  
sopiras!

— Envenu, eniru en mian kavernon ermitan,  
sur kies altaro plu estas nek dio, nek ĉast',  
en kiu anstataŭ la pio de l'preĝoj kaj fast' —  
reeĥas en noktoj diboĉaj orgioj senbridaj!  
Malamu, centfoje malbenu,  
sed — venu!

Ljudmil Stojanov

## Remilo

Laŭ la praaj verdondaj riveroj, peze fluaj, kun faldoj el or',  
post militoj mi hejmen revenis, al Skituj', kvazaŭ sonĝe, en dorm'.

Mia brako tro laca nun estis, post la lasta batal-furioz',  
kaj navigis mi tage kaj nokte, kaj ne estis moment' da ripoz'.

Jen forfalis la lastaj folioj, vent' ekvipis la montojn en for',  
kaj mi serĉis la Urson, regantan super mia gepatra la Nord'.

Estis sepa nokt' netravedebla, estis nokto simila al mort',  
kaj ĝi estis freneza kaj nigra, alpremita al akvo kaj bord'.

Kaj subite sin supre deŝiris, kiam serĉis mi vojon al cel',  
de la nokta ĉiel' sin deŝiris radiantaj kaj klara verdstel'.

Ho, ĝi kvazaŭ la koron enflugis, kaj revundis — ĝis sanga dolor',  
kaj devigis min tion repensi, kion ĉiam evitis memor'!

Ĉar mi tiam pri ŝi rememoris — necedanta, fieraj principin',  
kiu kvankam ne indiferece, sed por ĉiam forlasis ŝi min'.

Ĉu l'aŭtunaj sendormaj tempestoj ne honoris vin per la tutfort'?  
Ĉu ne same en koro fieraj vokas fajre vin vorto post vort'?

Reflektanta mil stelojn, ĝi regis — la rigard' via per la pasi'.  
Malamik' min ne venkis — ĝi venkis per potenco kaŝita en si.

Kaj mi levis min, rompis la glavon, kaj elflustris buŝ': Ne plu batal'!  
Ĉar pli fajras la kor' de virino, se al ni ĝin prezentis fatal'!

Ĉar pli firmas anim' ol kiraso; pli fidela ol glav' estas am',  
ve al tiu, la mort' kiun, tamen, al eterna kondamnis viv' jam!

Kaj droninte en noktan mallumon, liberlasis remilon mi, kaj —  
per frostmanoj mi premis la frunton bruligitan de pens' kaj malgaj'.

Trad.: *Miti*

Svetoslav Minkov

## La papago de la foiro

Dikaj araneaĵoj ludas sur la plafono  
kaj la muroj. Ekstere la akvo bruegas,  
kvazaŭ giganta, peza segilo segas la  
lignan konstruaĵon de la muelejo.

— Kla kla-kla-kla! — kantas la mal-  
nova rado.

— Kla-kla-kla-kla! — timigite ripetas  
rozkolora papago, gluita kiel folio sur  
la muro de ferkaĝo.

La muelisto Stat sidas sur malalta  
tripieda seĝeto, malrapide fumas sian  
longan argilan pipon kaj pripensas. Ne,  
pli prave li rememoras la travivaĵojn

de la foiro dum la lastaj tagoj. Kaj la  
rememoro estas tiel forta, ke sur lia  
frunto gravuriĝas profundaj sulkoj, kaj  
liaj okuloj rigardas per severa fiksa  
rigardo.

Kiom multe da ĵonglistoj kaj mirin-  
daĵoj estis tiel! Jen, Stat ankoraŭ vidas  
la malgranon hometon kun la kolorigita  
figuro kaj papera ĉapo sur la kapo. Li  
surrampas sur grandan lignan keston an-  
taŭ unu tendo, saltetas sur unu piedo  
kaj lia vizaĝo ŝvelas pro kriego.

— Rapidu, sinjoroj, la prezentado ko-

Kain Tera

## La morto de l'blindulo

Sur la brua strat' sterniĝas jam nebulo plumbe blua,  
kaj bruletas lampoj palaj envolvitaj en malĝoj'.  
La blindulo kurbiĝinta en mantelo multe trua  
el l'angul' etendas manon frostiĝintan por centfoj'.

Sed neniu priatentas la blindulon ĉifonulon;  
monereto eĉ ne sonas en argila la teler'.  
El rigardo trarompita de dezertaj du okuloj  
elradias la riproĉo de senfina la mizer'.

Tre subite kaj mistere al la maljunul' mizera  
jen sinjoro proksimiĝas — ŝajnas li suspekta tip'.  
Survestita bienule kun aspekto tre fiera,  
kun bastono en la mano kaj enbuŝigita pip'.

Senpasie la bonulo kun rigardo ŝtonigita  
monbileton verdan, grasan tiras el dika monuj';  
la almozon li transdonas al blindulo konsternita  
kaj direktas sin al l'aŭto, atendanta ĉe l'angul'.

Maljunulaj fingroj tremas, kaj balbutas delirante,  
la blindulo mirigita, vortojn simplajn pro dankem'.  
Sed kun mov' indiferenta la sinjoro silentante  
turnas sin kaj malpermesas danki pri la oferem'.

Brilarĝentaj neĝeretoj jam la trotoaron kovras.  
Kvazaŭ sonas gaja kanto en la kor' de l'maljunul'.  
Sub la ŝuoj de l'blindulo blanka neĝ' lanuga grincas —  
ŝajne eĉ ĝi partoprenas en la ĝoj' de l'malriĉul'.

\* \* \*

Fajfas la sireno aŭta kaj momente sur la strato  
sub la brila aut' ekveas glitfalinte la blindul' ...  
El la aŭto la sinjoro jen ekvidas senkompate  
kiel sur la mola neĝo jen ekfloris sangmakul'!

mencas! Interesa numero de afrikaj leonoj!  
La arlekeno Aŭgusto biciklas sur ŝnuro!  
Fraŭlino Julio volvas venenan serpenton ĉirkaŭ sian kolon!

La hometo sonorigas.

Liaj vortoj kaptas kiel fiŝkaptiloj la homamason, kolektiĝantan antaŭ la tendo.

Ektondras muziko.

— Rapidu! . . .

La hometo tiras la fadenojn de la fiŝkaptiloj kaj ĉiuj kuras internen.

Ĉevalo kuras en la mezo de la tendo tra la vasta areno, ŝutita per sablo. Supre, kelkajn metrojn da alteco, sur la granda ĉenero, kroĉita de dika ŝnuro, unu homo, ŝtelrigardas, volvita kiel bubo. La ĉevalo

pasas sub li, li saltas de la ĉenero kaj falas starigite sur ĝian dorson.

La homoj aplaŭdas.

Alia numero: eliras virino, vestita kiel reĝino. Ŝi levas super sia kapo gigantan serpenton, volvas ĝin ĉirkaŭ sian kolon kaj komencas ludi.

— Fraŭlino Julio! — iu krias.

La muelisto Stat sekvas per timiga rigardo la serpenton. En ĝiaj vitraj okuloj naĝas verdaj fajreroj kaj malrapida tremo volvigas ĝian korpon en kurblinio.

Kaj dum ĉiuj staras rigidaj pro la teruro de tiu ĉi timiga amuzo, la reĝino subite riverencas kaj malaperas post unu pordeto. La muziko tondrigas gajan kaj

dancigan melodion. Sur la sabla rado elsaltas du arlekenetoj kun sonoriletoj sur la vestoj. La alarmo malaperas kaj la vizaĝoj de la publiiko baniĝas en ridado.

La numero kun leonoj, la dresitaj simioj, la akrobato Aŭgusto, la surprizoj de la ĵonglistoj — ĉio ĉi viciĝas kaj pasas antaŭ la rigardo de Stat en plej mirindaj bildoj. Elirinte el la tendo, li estas sorĉita. Li moviĝas tra la amaso sen volo, lia rigardo ekbrulas en mil fajretojn de scivolemo.

— Historia panoramo!

— Reviviĝo de mortinto!

— Hinda orakolo divenas la estonton!

— La mondfino!

Maljunulo, kies kapo kun alta celuloida kolumo similas ovon en papera funelo, rekte staras antaŭ malgranda movebla tableto, sur ĝi estas amasigitaj ikonoj kaj dikaj nigraj libroj.

— Hej, onklo! Ĉu vi ne aĉetos la biblion! — li turniĝas al Stat kaj ektiras lian veston.

Sed Stat ne aŭdas lin. Li rapidas al spektakloj kaj la maljunulo kolere insultas post li.

Jen, la muelisto antaŭ la plej amuza afero — malgranda ligna budo de birdoj. Ili estas ŝlositaj en kaĝoj kaj tute ne similas al tiuj, kiujn oni renkontas en niaj regionoj: verdaj, flavaj, bluaj, oranĝkoloraj kiel flamo. Stat ĉirkaŭiras apud ili kaj rigardas ilin mire.

Plej interesaj, tamen, estas por li la papagoj. Kelkafoje ili revenas al siaj kaĝoj, staras kvazaŭ fiksitaj tie kaj longe ne deturnas sian rigardon. Stat konas tiujn ĉi birdojn. Li vidis ilin multajn fojojn sur la gurdo, eksidintaj sur la kesto kun paperbiletoj. Ne nur unu fojon li mem provis sian feliĉon ĉe ili. Mirindaj birdoj! Kaj kelkaj rakontis al li, ke ili parolas same kiel la homoj. Stat ne kredis tion ĉi, sed jen, unu verda papago eligas sian kapon antaŭen, preta kvazaŭ por bekfrapi ion en la aero. Ĝia beko malfermiĝas larĝe kiel fendo, farita de dika tranĉilo kaj li klare aŭdas delikatan voĉon, vicigantan malrapidajn, larĝajn vortojn:

— Bo-nan tagon! La fo-i-ro estas sonĝo!

Tie ĉi la fadeno de la pripensoj disŝiras sin kaj la miraklo aliformigas la efektivon en sonĝon. Incitita kaj maltrankvila, Stat promenas ĉirkaŭ la kaĝoj. Dume subite stranga deziro tranĉas lian menson. Li proksimiĝas al la mastro de la birdoj — homo, kiu mem similas al ia birdo, kun plata vizaĝo kaj delikata akra nazo. Li parolas al li ion, poste ili ambaŭ eniras en la budon.

Post kelkaj minutoj Stat paŝas tra la amaso kun granda ferkaĝo en la manoj kaj unu rozkolora papago en ĝi. Ĝi havas solenan aspekton kaj en ĝia rigardo ludas la saĝeco de malkaŝita enigmo...

Tiel, la muelisto Stat revenis de la foiro kun unu majesta rozkolora papago, kiu scipovis rakonti multajn aferojn. Sed tiu ĉi gaja birdo devis kaŝiĝi inter araneaĵoj, en la malliberejo de la muelejo — tie, kie la vivo aspektis kiel ia malnova paperfloro, blankigita kaj kovrita per faruna polvo. Kiam Stat fiksitis najlon sur unu el la muroj kaj kroĉis al ĝi la kaĝon, la papago eligis timigan kriegon kaj momente ĝi forgesis ĉiujn ridindajn vortojn, kiujn ĝi rakontis en la foiro. Kaj okazis io stranga: la rozkolora birdo komencis ripeti la klakadon de la rado. Rapide kaj mezurite, kvazaŭ en la muelejo turniĝis du radoj, kunigitaj en unu komuna akso.

Pasis kelkaj tagoj. Ĉiumatene, antaŭ ol komenci laboron, Stat iradis al la kaĝo, rigardis kompate la papagon kaj longe flustris ion nekomprenoblan. Eble tio ĉi estis vortoj de konsolo, kiujn li diris al sia amiko. Sed la malfeliĉa birdo ne komprenis lin. Freneza pro teruro, ĝi baraktis en la kaĝo: la koro de la muelejo forlogis ĝin sub sia peza frapo.

Kaj vespere, kiam la aero purpuriĝis kaj kaŝis en sin la blankan lumon de la fenestro, la malgranda ligna domo pleniĝas je vespertoj. Ili flugpendis kiel papilioj en la anguloj kaj plektis mortreton en la mezo de la mallumo. Tiam la papago surdigis la radon per freneza kriego — krio, kiu serĉis la vivon. La rozkolora birdo ne vidis la flugantajn mallumajn makulojn de la teruro, sed ĝi sentis tre bone la subtilan malvarmon de iliaj flugiloj ĉirkaŭ sia kaĝo.

En tiaj minutoj la zorgo streĉis malsupren la longajn blankigitajn lipharojn

de la muelisto kaj turmento ekrampis sur lia vizaĝo. Li volis savi sian amatan birdon, redoni ĝian gajecon, sed li ne sciis kiel. Haltigi la movon de la rado — Stat ne kuraĝis fari tion. En tiu-ĉi movo li pensis, ke estas ŝlosita lia estonto kaj ke, se la koro de la muelejo ĉesos bati, la morto aperos kaj fermos per siaj ostaj fingroj liajn okulojn en la nevenkebla sonĝo de la eterno.

Kaj dume, la gracia pikilo de la timo eniĝadis ĉiun novan tagon ĉiam pli profunden en la birdon de la foiro. Ĝi ĉesis bekfrapi la nutraĵon, kiun Stat lasadis al ĝi en la kaĝon, kaj ĝia kriego komencis estingiĝi. Kiel rompita infana fajfilo, kiu ŝiras lastajn sonetojn, kvietajn, longedaŭrajn kaj raŭkajn — kva-zaŭ rustajn.

\* \* \*

Dum unu vintra nokto, senstela kaj senneĝa, kiam la vento enpikis en la muelejon akrajn sagojn de kriego, la papago falis de sia ligna lulilo.

— Kla-kla-kla-kla! — kantis la malnova rado.

Stat proksimiĝis kaj enrigardis en la kaĝon: tie kuŝis senmove rozkolora bulo.

La papago mortis, kaj la muelisto komprenis sian malsaĝan deziron enigi en sian dezertan mielejon malmulte de la ĝojo kaj la grandan miraklon de la foiro. Li flankenrigardis al la ligna defluilo, kie fluis la faruno. Kaj li vidis blankan, senfine longan rubandon, ĉirkaŭvolvantan la jarojn de lia peza kaj soleca vivado. De la infanaĝo — ĝis la grizaj harfaskoj super lia frunto.

El bulgara lingvo tradukis: *G. H.*

Diana D.

## La granda krimo

Frapitaj de teruro kaj malespero, patrinaj, ediznoj, infanoj kaj grizharaj maljunuloj — ni sendis nian karnon kaj sangojn, nian koron al la tutpopola buĉejo. Ni sendis rozkoloran junularon, honestajn kaj indajn filojn, kies alta kaj luma spriritito fajrerumis en ilia nobla rigardo kaj sur ilia frunto. Ni sendis nian personan kaj popolan fierecon, apogon kaj esperon . . . Ni sendis „la homon“ je buĉado! . . . Ho, teruro! Ho, blindiĝo! . . . Ĉu la milito ne estas la plej granda homa frenezaĵo kaj ne ŝarĝa malbonfaro, kiu ne havas egalan je si krimon kaj kiun nenio pravigas?! . . . Kial do vi, homo, nomas vin homo kaj laŭ kio vi distingiĝas de la besto, se ne laŭ via plej alta racio kaj laŭ tio, kio nomiĝas homeco?! Kaj ĉu ne estas tiuj du plej noblaj kaj fortaj armiloj, kiujn la naturo donis al vi por batali ĉiam en ĉio? Kial estas necesa al vi via propra sango, kiu frenezigas, sovaĝbestigas? . . .

Fine, konsumiĝis la homo en sia demonismo — venis la fino!! Niajn karnon kaj sangojn formaniĝis insektoj kaj agloj sur la sangoplenaj kampoj; niajn korojn pikis akraj bajonetoj kaj fuman-

taj pafiloj. Nian fierecon dispecigis enflamkriegantaj monstroj. . . Kun rompitaj koroj kaj larmoj pro doloro, ni renkontis nerekonoblajn kompatindajn restaĵojn de la homo, kiun ni sendis. Kadukaj, malsanaj, palaj ombroj en malbonodoraj ĉifonoj. . . kriplaj filoj, frapitaj kaj humiligitaj, — fizikaj kaj spiritaj invalidoj: — Kiom de ili perdis sian sangojn! . . . Kiom de ili senĉese tremas! Kiom de ili surdiĝis aŭ mutiĝis! . . . Kaj kiom de ili estas sen okuloj, sen manoj, sen piedoj — senformigitaj!!! . . . Tie vivantan kadavron — sian patron, kondukas malriĉigita infano al homa kompatato. . . Kaj la vico da invalidoj en veturiletoj, kiujn ni ofte renkontas, ĉu ĝi ne estas vipo en la vizaĝo de l'homo, pro lia honto kaj granda krimo?? . . . Kaj kiom da nigrekovritaj domoj, estingitaj fajrujoj, orfoj, mizero. . . Vi mem vidis kaj scias la senfine multajn teruraĵojn de la milito, kaj eble vi mem kaŝis iun fizikan aŭ spiritan vundon.

Kaj kial? Por kies bono?! . . . Por la homo, kiu sin reciproke ekstermis, kiu perdis sin mem! . . . Por la generacioj?! . . . Ho!!! . . .

Kaj ekmarŝis ree la rado de la vivo, puŝita de la ventega kaoso de la granda krimo.

Tiu mizera homo kaj la postfrontaj „herooj“, maroderoj diversaj, rabistoj, spekulantoj, procenteguloj kaj „princ milionuloj“, kiuj anstataŭ medaloj amasigis oron, formis la novan societeton, pli ĝuste la sovaĝbestejon, en kiu nova devizo estas anoncita: — „Mono, mono, rapida riĉiĝo, spektakloj, vino kaj virinoj. La vivanto — viva, la mortinto — morta. La tagojn, kjuj restis al ni nun, ni vivu plene“. Kaj ili haltis antaŭ nenio, ili malzorgis pri ĉio . . . Estas disŝetitaj, eluzitaj la spiritaj trezoroj de la homo. La sangumita homo, kutimiĝinta je fajro kaj bajoneto, piki kaj piedpuŝi fratajn kadavrojn — ne estas ĉiam la sama. Li senvalorigis kaj kondukis sian propran vivon al nenio. Ili mortigadis kaj mortigas sin kiel muŝojn. Ĉe plej malgranda disputo — bajoneton, kuglon, ĉiuspecajn sovaĝbestaĵojn! Frat' fraton atakas;

fil' patron mortigas; patro sian familion ekstermas . . . ktp. Malsanoj, mizero, ruiniĝo, plena spirita kaj fizika perdiĝo . . . degenero kaj malapero.

Nenio stranga! — Natura marŝo de la aferoj post ĉiu granda krimo, post ĉiu milito. Jen ĝiaj belaĵoj, jen ĝiaj profitoj, jen la rezulto!! . . . Jen la tragedio de l'homo!!

Starigitaj jam antaŭ tiu ĉi fakto — tiu frapanta kaj sufokanta realeco — vice kun la klopodoj en ĉiuj direktoj por la savo kaj malebriigo de la homo, — ni esperu: — „Ĉiu malbono por bono“. Ke la homo prudentiĝu, ke li lernu sian lecionon el la historio de sia pasinteco, de la nuna travivaĵo, kaj neniam plu permesu ankoraŭ foje la grandan krimon — la militon — honto kaj malhonoro por la XX. jarcento kaj ĝia homo, se li ne volas por ĉiam malaperi kaj porti malinde sian nomon homo.

El la aŭtorina manuskripto, tradukis:

*Ivan H. Krestanov* — Sofia.

## Ankoraŭ iomete pri s-ino L. Ŝiŝmanova

Kun granda ĝojo mi legis la pravajn vortojn de s-ro Oktomvrijski pri s-ino Ŝiŝmanova, okaze de ŝia jubileo. Tamen mi dezirus aldoni ankoraŭ ion, ĉar ni, la vivantoj, neniam diras sufiĉe da bono por niaj meritplenaj samtempanoj.

Tio okazis en fremda lando. La tiea verdsteliano invitis min al sia Landa esperanta kongreso. Ĝin prezidis fama sciencisto. La lasta, dum malferma parolado, pompe asertis: »Por ellernado de fremda lingvo oni bezonas almenaŭ unu jaron da obstina laboro, sed por ellerno de esperanto sufiĉas nur semajno (?!?). Tamen, pro trookupiteco, mi ankoraŭ ne fariĝis praktikanta esperantisto«. La lastaj vortoj de la eminentulo falis kiel malvarma duŝo sur mian kapon. Tiam klariĝis al mi, ke la honoraj famuloj ĉiam helpas nian aferon, sed tiu helpo estus multe pli efika, kiam ili estigas sin praktikantaj, agantaj kaj efektivaj samideanoj.

Nun ni traflugis en alian landon, tie kie mi staĝis en unu biĉeno. Iun tagon tie min vizitis gesinjoroj Ŝiŝmanov. Estis al mi konate, ke en la unua tempo de nia

esperanta historio, kiam estis heroeco nomi sin verdsteliano, s-ro profesoro Ŝiŝmanov firme ekstaris je la flanko de nia samideano kaj per sia filologa aŭtoritato kuraĝe defendis ĝin de la furiozaj atakoj ĉiufankaj. Kaj tion la fama sciencisto faris estante nur esperanto-simpatulo.

Sed en la menciita tago de la vizito, mi estis tre agrable surprizita, aŭdinte s-ron Ŝiŝmanov provanta paroli esperanton. Estis kurioze konstati, ke li eraris same, kiel ni, la ordinaraĵoj esperantistoj, kiam ni ĝene prononcis la unuajn esp. vortojn. Tamen heliĝis al mi, ke la popola konsilo: »forĝu multon por fariĝi forĝisto« validas ne nur por ni, la ordinarioj, sed ankaŭ por la talentuloj, kiel la menciita lingva sciencisto.

Ankoraŭ ion tre agrablan mi aŭdis dum la sama tago — tio estis la patrina maniero, per kiu s-ino Ŝiŝmanova korektis sian edzon. (En tiu tempo ŝi jam estis progresinta samideanino). Tiel nia honora prezidanto fariĝis efektiva samideano kaj per tio pligrandiĝis la potenco ne nur de la bulgara, sed de la tuta esperantistaro.



## XXVIII-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN WIEN 1936

8-15. (5-18) AŬGUSTO.



### XII-A SOMERA UNIVERSITATO

KULTURAJ KAJ EKONOMIAJ PROBLEMOJ DE MEZ-EŬROPO

### INTERN. KONFERENCO DE VIRINOJ VOJAĜO TRA AŬSTRIO

SALZBURG - WIEN - SEMMERING - GROSSGLOCKNER - SALZBURG  
ĈARMAJ URBOJ - NEĜKOVITAJ MONTOJ - BLUAJ ALPOLAGOJ - DANUBO

### FESTARANĜOJ

KOSTUMBALO: „LA KONGRESO DANĈAS“

OPERETO: „LA BIANKA ĈEVALETO“

KONGRESEJO: LA FESTALONEGOJ DE IMPERISTRAS KASTELO „HOFBURG“  
ADRESO: ESPERANTO-KONGRESO-WIEN-NEUE BURG.

(Prelegserio pri la temo: „Kulturaj kaj ekonomiaj problemoj de Mezeŭropo“)

Protektoro: s-ro Wilhelm Miklas, federacia prezidanto de Aŭstrio

Honora komitato: prezido: fed. kanceliero aŭstria, d-ro Kurt von Schuschnig.

Membroj: La registaro kaj la rektoroj de la vienaj altlernejoj.

### Gvidaj ideoj pri la 12-a somera universitato

La 12-a somera universitato estu aranĝata en maniero, tute nesimila al siaj antaŭaj modeloj. Dum la ĝisnunaj kongresoj parolis ekskluzive en esperanto pri diversaj temoj de sia scienca fako diverslandaj scienculoj, sed nun ĉiuj prelegoj kaj paroladoj grupiĝos ĉirkaŭ unu komuna tre grava kaj aktuala temo, grava ne sole por Aŭstrio, sed

Jen ankoraŭ kion ni ŝuldas al nia jubileantino — s-ino Lidija Ŝiŝmanova.

Nun kiam ŝi estas posedantino de tiom riĉa trezorejo de spertoj, koncerne la belon, veron kaj bonon, ni bondeziru al ŝi, ke ŝi ĝisatendu almenaŭ sian centjaran jubileon, por ke ni povu profiti de ŝiaj trezoraĵoj, de kiuj ni nun havas tiel grandan bezonon.

Kneĵa, la 3-an de marto, 1936.

Agro

ankaŭ por ĉiuj ĝiaj pli aŭ malpli proksimaj najbarŝtatoj, nome: „Kulturaj kaj ekonomiaj problemoj de Mezeŭropo“.

Tiu ĉi temo estu traktata de ministroj, reprezentantoj de diversaj registaroj, profesoroj kaj socialekonomoj el ĉiuj partoprenantaj ŝtatoj. Ĉiu parolanto faros sian referaton en sia gepatra, nacia lingvo aŭ en esperanto; en la unua kazo lia parolado estos tradukata esperanten.

Por tiu ĉi somera universitato la diversaj registaroj ĵus estis oficiale invitatataj de la registaro aŭstria, kiu mem en ĝi partoprenos, kaj estas kredeble, ke la registaroj delegos reprezentantojn jam pro la aktualeco de la temo kaj pro la fakto, ke iliaj delegitoj povos paroli, la unuan fojon en la historio, ĉiu en sia gepatra lingvo al plurmila elita aŭskultantaro el pli ol 40 nacioj. Krom la aŭstria, la greka registaroj akceptis delegi reprezentanton, aliaj registaroj espereble baldaŭ sekvos.

Somera universitato de viena kongreso havos tute specialan karakteron: ĝi estos kvazaŭ grandstila internacia peresperanta fakkonferenco en la kadro de tutmonda esperanta manifestacio. Kiel la sola lingvo por tradukado estos aplikata ekskluzive esperanto. Per tiu fakto la unuan fojon okazos, ke ĉe internacia kongreso eĉ la reprezentantoj de la tiel nomataj „malgrandaj nacioj“, malgrandaj ne laŭ la grado de sia kulturo, sed sole laŭ la nombro de sia loĝantaro, kies lingvo eksterlande estas ĝenerale nur tre malmulte uzata, povos sin turni rekte en sia gepatra, nacia lingvo al diversnacia publika el ĉiuj mondpartoj kaj ili povos esti rekte komprenataj de la reprezentantoj de l' nacioj, partoprenantaj en la kongreso, per la tutmonda helplingvo esperanto. Per tio tamen ankaŭ la malgrandaj nacioj venas al sia rajto, dank' al esperanto, povi sur internacia forumo sin esprimadi en sia propra lingvo. Kaj ni konstatos kun ĝojo kaj kun fiero la mirindan fenomenon, ke tiu esperanto, pri kiu ĝiaj kontraŭuloj siatempe asertis, ke ĝia grandskala uzado povos subfosi la signifon kaj disvastiĝon de la naturaj naciaj lingvoj, ke ĝuste tiu ĉi esperanto ebligos la realigon de unu el la

# ЕСПЕРАНТСКИ НОВИНИ

— На 1. февруарий т. г. в Женева се помина директорът на Международния есперантски съюз — съидейникът Robert Kreuz. Съ смъртта на последния международното есперантско движение губи единъ активенъ есперантистъ отъ голъма величина.

— Банка Ungaro italiana, societa anonima в Будапеща отъ 1. февруарий т. год. въведе официално есперанто въ своята кореспонденция и служба.

— Конгресътъ на югославянскитъ есперантисти ще се състои в Любляна отъ 31. май — 2. юний т. година.

— В-къ „Желъзничарски подемъ“ въ брой 17. отъ 20. януарий т. г. публикува статия „Есперанто за България“ отъ нашия съидейникъ Ив. Х. Кръстановъ. Сжщиятъ вестникъ дава често съобщения за нашето движение.

— Общинскиятъ съветъ в гр. Тара — Естония е наименовалъ една отъ главнитъ улици на града съ името: „Esperanto“.

— Френскиятъ занаятчийски съюзъ въ последното си заседание съ болшинство е гласувалъ за въвеждането на есперанто въ всички занаятчийски училища.

— Фабриката за по целанови издѣлия „Ломонсов“ въ Ленинградъ е издала своя ценоразписъ на есперанто. На произведенията си предназначени за износъ фабриката е поставила фабричната си марка написана сжщо на есперанто.

---

plej gravaj kaj justaj naciaj postuloj, nome: la egalrajtigon de ĉiuj naciaj lingvoj sur la kampo de internacia kultura kaj politika kooperado!

\*

Съидейниците, желаещи да посетятъ 28-ия международенъ есперантски конгресъ въ Виена, да се отнесатъ до организатора на екскурзията: *Иванъ Котовъ, Българска нар. банка — Русе.* отъ когото ще получатъ подробни сведения.

— Естонската пощ. администрация е издала пощенски карти съ текстъ на естонски и есперанто.

— La Lyon'a foiro eldonis novajn presaĵojn en esperanto:

1. Novan kvinkoloran afiŝon kun esp. teksto.

2. Novan prospekton en esperanto. Ĝi estas sespaĝa, dukolora kaj ilustrita per desegnaĵoj kaj fotografaĵoj.

3. Belan kvardekpaĝan broŝuron eldonita de la Lyon'a turisma oficejo kun klarigoj en esperanto

Al ĉiu petanto, la Lyon'a foiro sendos senpage tiujn presaĵojn, kune kun kelkaj sorbpaĵeroj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Sin turnu: Foire de Lyon, Esperantofako, Rue Ménestrier, Lyon, Francujo.

— Pariza foiro eldonis artan broŝuron pri la foiro en esperanto, ankaŭ afiŝon 40/60 cm. kaj 65/100 cm., kies esperantlingva teksto enhavas la frazon „Esperanto uzata“.

Ĉiu povas senpage ricevi de: Foire de Paris, 23, N. D. — des Victoires, Paris 2-e.

— Viena foiro eldonis belan prospekton en esperanto.

Ĝi estas ricevebla kontraŭ mendo ĉe Viena foiro: Zentralbüro der Wiener Messe — A. G. Messenplatz 1, Wien VIII. — Aŭstrio.

— En aŭgusto de la antaŭa jaro fondiĝis sur la teritorio de la lingvo esperanto, la psika esperantista ligo, kiu petas humilan lokon flanke de la multaj jam ekzistantaj asocioj.

La novenaskito iom timeme, enpaŝas en la esperantistan mondon; tamen ĝi atendas amikan akcepton ĉe siaj pli aĝaj fratinoj kaj bonvolajn recenzojn kaj intereson ĉe la gesamideanoj.

Dum la ĝis nun fonditaj societoj aplikas esperanton ĉefe pri la materia, praktika kaj ideala bezonoj de la homo, la nova societo intencas kulturi per ĝi speciale ĝian psikan, spiritan flankon.

Interesatoj, ĉu pri informo, ĉu pri membriĝo, bonvolu turni sin al s-ro Atanas Nikolov — Sevlievo.

— Бившиятъ ни редакторъ г. Ив. Х. Кръстановъ, 6 септемврий 2, София ни моли да съобщимъ, че книгата му »Тра Ейгоро пер есперанто«, илюстровани лѣтни бележки и впечатления отъ 30-годишния му есп. животъ, частъ отъ които излѣзоха и въ »В. Е« мин. год., е готова за печатъ. Всички предплатили до 1. май т. г. ще я получатъ срещу 75 лв., а следъ това цената ѝ ще бѣде двойна.

— Открива се подписка за записване абонати за **най-пълния** българо-есперантски речникъ, съставенъ отъ съидейника Георги Атанасовъ. Речникътъ ще бѣде по обемъ двойно по-голямъ отъ до сега съществуващитѣ българо-есперантски речници, т. е. около 20 печатни коли и съ толкова много производни думи, щото българскиятъ есперантистъ ще може съ най-голяма леснина да превежда на есперанто българска литература.

Желаещитѣ да получатъ речника съ 40% намаление, трѣбва да съобщятъ съ една пощенска картичка найкъсно до 10. априлъ на адресъ: Георги Атанасовъ, ул. »Тетевенска«, № 64 — София.

## IX-a jugoslava kongreso de esperanto

okazos de 30-a de majo ĝis 2-a de junio j. k.  
en **Ljubljana**

Bulg. esp. asocio ricevis inviton pri la kongreso de niaj frataj jugoslavaj s-anoj.

La loka kong. komitato varme invitas la bulgarajn samideanojn, ke ili vizitu la kongreson.

Lo-ko-ko ankaŭ sciigas nin, ke en Jugoslavio la vivo estas malmultekosta. La fremdlandaj s-anoj sur ĉiuj jugoslavaj fervojlinioj ricevos 50% rabaton, ankaŭ malmultekostajn loĝadon kaj manĝadon. Verŝajne ili estos liberigitaj de vizo-pago.

Vin turnu al:

**Esperanto-klubo (kongreso) en LJUBLJANA — JUGOSLAVIO**

Всички суми превеждайте чрезъ пощ. ни чекова с/ка № 1133.

Въ села, кждето нѣма т. п. станции, могатъ да ни се изпрачатъ и пощенски марки.

## DONACITAJ SUMOJ POR NIA ESPERANTO-DOMO:

	Levoj
53. Dimitr Kostov — Sofia	30
54. Radka Rajnova	50
55. Ivanka Daskalova	50
56. Ivan Valčanov	150
57. X. Y. Z.	50
58. Dimitr Batoev — v. Batak	100
59. Minčo Alev — Plovdiv	25
60. Hristo Spirdonov — stac. G. Orehovica	40
61. Aleksandr Dinkov — v. Klimentinovo	20
62. Bogdan Popov — Plovdiv	20
63. Atanas Demirev — Kargali	120
64. Stefan P. Stojanov — Burgas	50
65. Dimitr Červenkov	50
66. Torkom Aslanjan	25
67. Aron Berković	25
68. Kiprilov	25
69. Garo Babaĝanjan	25
70. Minčo Kermidčiev	20
71. D-ro St. Kadiev — Sliven	100
72. Ivan Popov — v. Kule mahle	10
73. Georgi Savov — Omortag	50
Membroj de s-to »Espero« — Ruse	
74. Ivan Josifov	200
75. Ivan Grozev	100
76. Veselina Dankova	100
77. Toma Černev	30
78. Vasil Petrov	30
79. Petr Maĝarov	20
80. Petranka Lazarova	10
81. Jurdanka Valkova	10
82. Bosilka G. Gabeva	10
83. Coni Pešev	10
84. Atanas Markov	10
85. Jurdan D. Kallnov	5
86. Ljutfi Arifov	20
87. Atanas Kràstev	10

De pasinta numero 8,700

Entute ĝis 31. III. 1936. 10,300

Samideanoj, bedaŭrinde, sed fakto estas, ke ĝis nun malmultaj sendis sian helpmonon por nia esperanto-preĝejo. Rimarkinde estas ankaŭ, ke ĝis nun krom s-to »Espero« en Ruse, aliaj societoj ne sendis sian heipon!

Ni denove alvokas vin! Ne forgesu, ke ni devas pagi ankoraŭ 14,000 levojn!

Samideanoj, tuj sendu viajn brikojn, por senmortigi viajn nomojn sur la paĝoj de la ora libro de nia domo!

## Радио

Презъ м. февруарий т. г. следнитѣ станции предадоха сказки, забави и сведения на есперанто: Римъ, Хилверсумъ, Кутре, Лилъ, Ленинградъ, Женева-Сотанъ, Лионъ, Минскъ, Моравска Острава, Фунчалъ, Варшава, Краковъ, Рис де Жанейро, Парижъ ПТТ, Алпъ Греноблъ, Лиможъ, Виена, Бърно, Ница-Канъ, Мотола-Стокхолмъ, Осло.

— По случай на нѣколко статии въ естонското списание „Радио“ относно желателни радио-езици, се констатира, че едничкото възможно разрешение за това може да бжде есперанто, защото никой народъ не ще се съгласи да се приеме нѣкой националенъ езикъ като международенъ радио-езикъ.

— Отъ Моравска Острава съобщаватъ, че занапредъ ще се предаватъ редовно всѣки вторникъ есп. сказки въ 19—20 ч.

— Отъ Франция съобщаватъ, че мощната станция въ Лилъ скоро ще разпраща вълни по цѣла Европа и че есперантски получасове много добре и ясно ще се чуватъ и моли есперантиститѣ да обадятъ какво желаятъ да слушатъ презъ тия получасове.

Фунчала СТЗАО (О-въ Мадейра, Португалско) 75 м. всѣки вторникъ, четвъртъкъ и сѣбота 22 ч.; сведения за есп. движение.

Виена — всѣка срѣда 19.30 ч. и всѣки втори петъкъ на месеца въ 23.40 часа.

Ленинградъ 12224.5 всѣки четвъртъкъ 23.50 и всѣка недѣля 23.20 ч. 29-D — Felietonoj de eminentaj sovetiaj verkistoj. 31-M 1. Monata kroniko de socialisma konstruado. 2. Esp. movado. Respondoj.

Моравска Острава 269. 5 м. 11.2 кв.

Прага 470.2 м. 120 кв.

Прага 11 249. 8 м. 5 кв.

Бърно 325.4 м. 32 кв.

Братислава 298.8 м. 13.5 кв.

Кошице 259.1 м. 2.6 кв.

Римъ 420. кс. 713 всѣка сѣбота въ 18.05.

## DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Stewart J. Bruce. 57 Ringstead Crescent, Crosspool, Sheffield 10, Britujo — per leteroj kaj per ilustritaj poŝtkartoj, kun juna sinjoro аѹ fraŭlino inter dudek kaj tridek jara.

S-ro Andreas Bender, Friedrichstr. 26 Neunkirchen Saar — Germanujo — per il. kartoj kaj interŝанги markojn.

S-ro Félix Brovo, Lumpiaque Zaragoza — Hispanio, interŝанги p. m. kaj il. kartojn

S-ro M. Mauteca, Villarreal (Iar-telin) Hispanio, interŝанги p. m. kaj il. kartojn.

Gejunula abstinenacula societo „Mra-koborec“, vil. Gurovo — Tetevenaĵ regiono, Bulgario — kun jugoslavaj abst. societoj.

## Конгресътъ приближава.

Центр. комитетъ ще трѣбва да даде своя отчетъ, а съидейницитѣ — делегати ще трѣбва да се произнесатъ по него.

Изпълнилъ ли е центр. комитетъ до сега своя дългъ?

Какво може той да направи безъ моралната и материална подкрепа на съюзнитѣ два и отдѣлнитѣ есперантисти въ България?!

Ние молихме за съдействие, ние апелирахме за подкрепа, но напразно . . . Малцина се отзоваха на този нашъ апелъ.

Молихме и абонатитѣ на В. Е. да се отчетатъ или, ако това нѣматъ възможностъ да сторятъ, поне да върнатъ обратно броя. Съ това тѣ ще ни избавятъ отъ излишни разноски и ще имаме точното число на редовнитѣ ни абонати. Колко малко се иска: 20 лева или да се върне броя. Нищожна жертва!

Докато по-рано бълг. есперантисти бѣха идеалисти, носители на възвишеното въ живота, днесъ идеализмътъ имъ се е изпарилъ. Егоизмътъ, материалното въ живота ги позече интересуватъ; днесъ тѣ животуватъ безъ да желаятъ да допринесатъ нѣщо за общото дѣло, за което доброволно сме пожелали да служимъ.

Но конкретно: Ние за последенъ пжтъ молимъ д-та и отдѣлнитѣ есперантисти да се отчетатъ и платятъ абонамента, защото ако това тѣ не сторятъ, ние не ще можемъ да издадемъ следния брой на В. Е.

Нека това се добре разбере!

# NIA VIVO

✓ **Vil. Bukjovci — Oreĥova reg.** Nia s-ano Doĉo Dim. Vasilev fervore laboras. Dank' al li oni fondis novan societon „Vilaĝa espero“, kiu jam havis sian unuan verdan amuzvesperon. Du ĉiuvesperaj kursoj kun 55 personoj gvidataj de s-ano D. Vasilev.

✓ **Vil. Galiĉe — Oreĥova reg.** S-ano D. Vasilev paroladis en la salono de la lernejo je temo: „Ĉu ebla kaj necesa estas internacia lingvo esperanto“. Pli ol 300 personoj vizitis la paroladon, kiu brile efikis. Kurso kun 30 personoj. Societo fondota. Esp. ekspozicio malfermita. Propagando grandskala!

✓ **Vil. Gloĵene — Oreĥova reg.** Nia s-ano Dim. Goranov vigle agadas. Li paroladis en la salono de la lernejo pri esperanto kaj pri la vivo de Zamenhof. Bona sukceso. Kurso kun 10 personoj gvidata de li.

✓ **Kjustendil.** Du sukcesplenaj paroladoj pri „Esperanto kaj la modernaj lingvoj“ en la geknaba gimnazio kaj metiista lernejo de s-ano Krestanov. Granda entuziasmo.

✓ **Kneĵa.** Funkcias du kursoj: unu por komencantoj kaj alia — por progresintoj. La unua estas vizitata de 12 personoj kaj la dua de 6. La unuan gvidas B. Milĉev.

✓ **Pazarĝik.** Societo „Radio“ dum la verda semajno je la 2. II. aranĝis publikan paroladon en la salono de legejo „Videlina“. Parolis la vicprezidanto de B. E. A. d-ro Zaĥari Zaĥariev. La salono estis plena. S-ano Ĉervenkov — vicurbestro malfermis la kunvenon per konvenaj vortoj por nia ideo. Malfermitaj du kursoj kun 30 personoj — por komencantoj kaj progresintoj.

✓ **Vil. Raĵevo Konare — Plovdiva reg.** Nia s-ano St. Trifonov gvidas kurson. Partoprenas 10 junuloj — vilaĝanoj. Baldaŭ estos malfermita dua kurso.

✓ **Ruse.** Societo „Espero“ elektis novan komitaton: prez. Iv. Josifov, subprez. Lazar Dimitrov, sekr. Dim. Ivanov, kas. P. Maĝarov, bibl. Jord. T. Vâlkova kaj kons. Angel Slavov.

— Je la 2. II. la sama societo okaze de la verda semajno aranĝis en la klubejo kunvenon. Partoprenis 70 samideanoj kaj

gastoj. S-ano Dim. Ivanov referis pri la signifo de la verda semajno. Rezulto: 10 novaj membroj.

— Je la 8. II. en la salono „Sofia“ amase vizitata amuzvespero. Granda materiala kaj morala sukceso.

— Je la 22. II. okazis karnavala vespero ankaŭ kun granda sukceso.

— Je la 26. II. ĝenerala kunveno en la klubejo de la societo. Oni tralegis la alvokon de c. komitato por esp. domo kaj unuanime akceptis helpi la sofian societon. En rezulto oni tuj kolektis la sumon 565 levoj.

— Societo „Solidareco“ aranĝis kurson en la lernejo „Ang. Ĥaĝioglu“.

✓ **Sliven.** La loĝio de I. O. G. T. „Vazraĵdane“ № 1 kaj la Junula abst. asocio „Vzaimnopomošt“ malfermis esp. kurson gvidata de s-ano d-ro St. Kadiev. Granda entuziasmo. 50 personoj vizitas la kurson.

✓ **Sofia.** La societo, dank' al sia domo, jam realigas viglan agadon. Ĉiu-merkrede okazadas ĝeneralaj amasaj kunvenoj dum kiuj oni prelegas en diversaj temoj kaj okazas tre interesaj diskutoj. Ĝis nun prelegis la jenaj gesam.: P. Pamporov — „Tra Eŭropo per esperanto“, St. Hesapĉiev — „La unua epoko de esperanto, Emil Stratev — „La krizo en esperanto“, Iv. Sarafov — „Ĥr. Botev“ kaj N. Dafovskaja — „Esperanto kaj la paco“.

— La estraro kunvenadas vendrede kaj solvas administrajn kaj teknfkajn demandojn.

— La biblioteko, kvankam ankoraŭ malriĉa, estas aranĝita, kaj libroj estas disdonataj; ankaŭ la legĉambro estas aranĝita kaj ĉiu-vespere malfermata, kie oni povos legi la novajn gazetojn kaj ĵurnalojn, sendataj al ni de la tuta mondo.

— Elementa kurso funkcias depost unu monato, ĉiun lundon kaj ĵaŭdon, gvidata de s-ano Iv. Sarafov; baldaŭ komencos kurso por perfektigo.

— Estas aranĝata esperanto-horo administrata de nia ŝalmisto Iv. Iliev, ĥormajstro estas nia malnova s-ano G. Atanasov. Estas multaj dezirantoj kanti. Ĝi okazadas ĉiun saboton vespere. Membroj multaj aniĝas.

— Estas efektiviginda la ideo pri havigo de bona radioaparato, per kiu ni povos aŭskultadi esperanto-prelegojn kaj kronikon, kiuj lastatempe konstante plimultiĝas, eĉ abundas jam; tamen ĉefe nun nin okupas kaj zorgigas la demando pri la finpago de nia domo: ni ŝuldas ankoraŭ ĉirkaŭ 14 mil levojn kaj pro tio ni vokas al la malavaremo de nia gesamdeanaro.

— Baldaŭ aranĝota esperanto-ekspozicio de bonaj kaj efikantaj libroj en la librejo de Iv. Kojumĝiev sur la ĉefa strato „Car Osvoboditel“.

— Ĵus sukcese finis esperanto-kurso en la legejo „Ĥr. Botev“ kun ĉ. 30 personoj sprite gvidita de s-ano Pelin Velkov. Krom la kurso en la domo mem, estas malfermotaj tiaj ankaŭ en la Studenta-abstinenca societo, alia en la legejo „Aŭra“ kaj aliloke.

— Je 2. III. okazis amuzvespero en salono de la Slava societo.

— S-ano Martha Rooth parolis en esp. domo pri siaj vojaĝimpresoj. La sama parolis ankaŭ en „Union-Palace“ kun bulgara traduko de s-ano Iv. Krestanov.

**Vil. Stiĵerov — Sviŝtova reg.** Aperis nova verda flameto. Oni fondis novan societon. Elektita komitato: prez. Ilija Iv. Lazarov, sekr.-kasisto Mladen Bl. Iliev, konsilantoj Georgi N. Ivanov kaj Naum P. Atanasov. Kontr. komitato: Veska N. Bakalova, Liljana M. Todorova kaj Milka P. Popova.

**Varna.** Je 22. I. antaŭ radio Varna parolis nia s-ano Georgi Ĥr. Dimov — prezidanto de la Esp. societo en Varna — je temo „Kiel ni lernu esperanton“.

**Vil. Veliĉkovo — Pazarĝika reg.** Nia agema s-ano Vladimir Ŝkenderov — vilaĝestro, malfermis kurson vizitata de 20 personoj.

## RICEVITAJ LIBROJ KAJ GAZETOJ

### Libroj:

Зимно разписание на „Дойче луфтханза“.

✓ Aŭstrio — bela ilustrita katalogo.

Русско-есперантский словарь отъ Г. И. Тупицинь. Kuldigas iela 18-a dz. 4, Riga, Latvija.

✓ Indicatorul reprezentantiilor de comertz din Bucuresti (Adreslibro de la komercaj reprezentantoj en Bukureŝto (Rumanujo). Eldono de Komerca-industria ĉambro en Bukuresto.

✓ Astronomio, P. O. kesto 274, Shanghai, Ĉinio.

✓ Gramatiche vocabulari ed esercizi di lenghe internazionali esperanto pailadins furians. Adreso: Esperanto-udine, Piazza Vittorio Eman, 9 a.

Международная стандартизация языка в технике отъ д-ръ инж. Е. Вюстеръ. Превель отъ нѣмски О. И. Богомоловой. Подъ редакцията на Е. К. Дрезена, проф. Л. И. Жиркова, инж. А. Ф. Лесохина и проф. М. Ф. Маликова. Издание на Государственное издательство по стандартизация „Стандартпиз“, Ленинград—Москва.

Eldona societo Esperanto, Stokholm, Svedujo, eldonis novan, tre enhavoriĉan katalogon pri lernolibroj, vortaroj, literaturo diversspeca, propagandiloj ktp. La plej multaj libroj estas koncize priskribitaj kun indiko pri la jaro de la apero, nombro de paĝoj kaj speco de la enhavo. La katalogo, kiu estas dissendita en 10,000 ekzempleroj, estas en sveda lingvo.

✓ Kudlago, la malgranda eskimo. De N. van Hichtum. El la holanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. soc. Esperanto. Stockholm. 40 paĝ. Prezo 0:75 sved. kr.

Libreto por novuloj kaj junuloj, kiun ili kun ĝojo kaj utilo legos. La simpla, reala rakonto pri la simpatia eskima bubo Kudlago vekos nian simpatian por li kaj lia popolo.

La lingvaĵo estas glata, kaj oni plene povas rekomendi la libron al komercantoj kiel ankaŭ al pli lertaj esperantistoj, kiuj deziras sin distri per legado de interesa rakonto.

La kovrilo prezentas tutpaĝan originalan bildon de la malgranda Kudlago kaptanta fiŝojn.

✓ Revuo „Augusta Taurinorum“. Konstatinte la grandan intereson vekita de la esperanta numero de la revuo „Augusta Taurinorum“ disdonita senpage al la kongresanoj de la 27-a u. k. en Roma, la esperanto-grupo de Torino sukcese petis de la komitato de torinaj manifestacioj pluan senpagan disdonon de la revuo al la esperantistoj, kiuj ne partoprenis la kongreson.

Do, kiu deziras tiun belan revuon, skribu tuj, sendante du respond-kuponojn aŭ poŝtmandaton de 3 italaj liroj por la poŝtelspezoj, al la Komitato manifestazioni torinesi — Via Arcivescovado, № 7 — Torino (Italio).

Равнината пѣе... (стихове) отъ Иванъ Василевъ. Издание на Свѣлоструй, с. Щръклево — Русенско.

Вечери надъ човѣчеството (стихове) отъ Димитъръ Сотировъ. Издание на Свѣлоструй, с. Щръклево — Русенско.

Gvidfolio por vojaĝantoj en Манѣоукъо. Eldono de Sud-Manĉuria fervoja kompanio (S. M. R.).

Календаръ Братство 1936. Севлиево.

### Gazetoj:

Antaŭen, Аптекарска защита, Argentina esperantisto, Aŭstria esperantisto, Балканско ехо, Belga esperantisto, Братство, Bulteno de Ĉeĥoslovaka asocio esperantista, Bulteno de Frateca esperantomovado, Bulteno de Internacia scienca asocio esperantista, Bulteno de Maristaligo esperantista, Bulteno de Tutmonda asocio kolektanta, Ĉeĥoslovaka radio-bulteno, Човѣкътъ, Dansk Esperantoblad, Deutscher Esperanto-Bund E. V., Esperantobladet, Esperanto radio bulteno, Fluganta skribilo, Franca esperantisto, Frateco, Хасковски новини, Herezulo, Heroldo de esperanto, Hispana esperantogazeto, Informilo de germana esp. ligo, Informilo de Zamenhof instituto, Interligilo de l'P. T. T., Internacia medicina revuo, Internacia pedagogia revuo, Internacia „S. O. S. bulteno“, Italaj kronikoj pri l' turismo, Jugoslovenska poŝta, telegraf, telefon, Cosmoglotta, La juna vivo, La kosmo, La kritika observanto, La lumo

orienta, La permanenta revolucio, La suda stelo, L'esperanto, Le phare de l'esperanto, Les nouvelles de la Seine, Le Travailleur Esperantiste, Lingvo internacia, Literatura mondo, Народно здраве, Nia gazeto, Новъ животъ, Pola esperantisto, Portugala esperantisto, Regno de pensoj, Revuo orienta, Ruĝa esperantisto, Sennacieca revuo, Sennaciulo, Skolta bulteno, Стопански прегледъ и домакинство, Стражъ, Sur posteno, Svenska Arbetar Esperantisten, Svenska Esperanto-Tidningen la espero, Свѣлоструй, Tempo, The British Esperantist, Трезва младежъ, Тракиецъ, Verda revuo.

---



---

## 20—50%

malaltigis la prezojn de siaj eldonaĵoj ekde 1. januaro ĉijara

### Literatura mondo

pro nova valutpolitiko de la Hungara nacia banko kaj per tio ankaŭ la prezoj de ĝiaj neserie aĉetataj libroj apartenas al la plej malaltaj en nia literaturo. Jen kelkaj ekzemploj:

Julio Baghy: Viktimoj, svfr. 2.50 anstataŭ svfr. 5. — Enciklopedio de esperanto, I—II broŝurita, ilustrita svfr. 18. anstataŭ svfr. 30. — Plena gramatiko de esperanto svfr. 6. anstataŭ 8.

Tiuj nunaj prezoj senvalidigas ĝenerale ĉiujn favorajn prezojn, konstatitaj ĝis nun por kurzsuferantaj landoj. Tamen, se tiuj antaŭaj prezoj estis ie pli malaltaj, ili ne estas plialtigataj.

Por ne kaŭzi ĉagrenon, ni repagas al ĉiu mendinto, kiu faris sian mendon el niaj libroj post 1. januaro la diferencon inter la malnova kaj nova prezoj. Bonvolu skribu pri tio al via mendloko.

Detalan liston pri la malaltigo sendas al vi volonte la eldonejo »Literatura mondo«, Hungarujo, Budapest IX. Mester-u. 53 kaj ĉiuj libristoj.

---



---

## 15 jaroj

La internacia pedagogia revuo  
(oficiala organo de T. A. G. E.)  
ĵus eniris la 15-an jaron de sia  
ekzistado.

Ĉu vi komprenas la signifon de tio?  
Tio ja atestas, ke I. P. R. rajte,  
ludas sian rolon en la esperanta  
gazetaro.

Ĉu ankaŭ por vi?  
Se ne, konatiĝu kun ĝi kaj petu tuj  
senpagan specimenon al la admini-  
stranto: P. Korte, Schoolstraat, 13,  
V e e n d a m (Nederlando).

## POŝTISTOJ, TELEGRAFISTOJ, TELEFONISTOJ!

La interligilo de I'P.Ĝ.T.  
via organo, 324 rue Lecourbe,  
Paris 15 e,

eldonas la tutmondan profesian  
adresaron vian, statutoj de llepto,  
nia historio, niaj gvidantoj, niaj  
realigoj, niaj esperantistaj gekole-  
goj laŭurbe, esperantista gazetaro,  
fakaj asocioj kaj fakaj organoj, la  
filatelista mondo, la teknikaj revuoj.

Unika dokumento!

Tuj informu vin. Senpage por ĉiu  
membro. Senpaga specimeno de la  
organo laŭ peto.

**Всѣки есперантистъ трѣбва да стане членъ на Българския ес-  
перантски сѣюзъ, да получава сѣюзния органъ и да сѣдействува съ  
всички сили и срдства за успѣха на общото дѣло!**

**Сѣдейнико, изпълни своя есперантски дългъ!**

### Български есперантски сѣюзъ доставя следнитѣ издания:

1. Kurso de esperanto por bulgaroj, VII. eldono, de At. D. Atanasov .	25 лв.
2. Възможенъ и нуженъ ли е междун. пом. ез. отъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	4 "
3. Есперанто отъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ . . . . .	2 "
4. Есперантски синтаксисъ отъ Зах. Захариевъ . . . . .	22 "
5. Есперанто ще завладѣе свѣта отъ д-ръ Д. Гаврийски. . . . .	12 "
6. За международния езикъ (анкета), съставилъ Ив. Х. Кръстановъ .	5 "
7. Речникъ на есперанто отъ Ив. Х. Кръстановъ . . . . .	75 "
8. Bulgara antologio " " " " . . . . .	75 "
9. Albumo de bulgaraj geesperantistoj, съставилъ Б. Октомврийски .	30 "
10. Esperanto-korelativoj, съставилъ Рад. К. Тричковъ . . . . .	5 "
11. 3-та конгресна речъ на д-ръ Л. Л. Заменхофъ . . . . .	2 "
12. 4-та и 5-та когресни речи " " . . . . .	2 "
13. Практична граматика на международния езикъ Есперанто . . . . .	3 "
14. Международната конференция за общъ търговски езикъ въ Венеция	5 "
15. Есперанто-български разговорникъ . . . . .	5 "
16. Портрети на д-ръ Л. Л. Заменхофъ (голѣмъ форматъ) . . . . .	15 "
17. Картички " " . . . . .	3 "
18. La espergo (есперантскиятъ химнъ — текстъ и ноти) . . . . .	3 "

Поржчкитѣ се изпълняватъ въ предплата.

Сумитѣ превеждайте чрезъ пощ. чекова смѣтка 1133.

Адресъ: Бѣлг. есперантски сѣюзъ, Алабинъ, 50, София.